# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 5-an de Decembro 2022

**Ĉeestantoj:** Jehoŝua Tilleman, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel; **zome:** Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝaj Mor, Gabi Zeevi. **Gastoj:** David Jiŝaj el Germanio (surloke), Igor, Viktor, Raja.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

## 1. Raportoj

a) **Amri**: nova kurso de "Nicocot" – 3 lecionoj por 15 gejunuloj en la 10-a klaso de mezlernejo en Modiin. ***Sukceson!***
b) **Ŝlomo** memorigas postuli de li la repagon pro veturkostoj ĝis la fino de la jaro! Krome, ELI ricevis la konfirmon pri adekvata librotenado por 2023. ***Dankon al Ŝlomo!***
c) **Jehoŝua** ricevis dokumentitan leteron de Adv. Adiel Melitz el Beer-Ŝeva pri la testamento de David-Dvir Dotan (iam konata kiel Mager/Ŝamgar) – laŭ ĝi ELI (pere de Jehoŝua) ricevis liajn librojn, sed la loĝejo mem kun la enhavo iris al la kunloĝanto de David! Pro la advokata postulo Jehoŝua reagis, akre priskribante la longan ekspluatadon de David far la kunloĝanto Ŝaĥar Or, kondamnita pedofilo, trudita de la Bonfarta Departemento de la Urbestraro de Beer-Ŝeva. Ĉar laŭ la opinio de nia advokato d-ro Modan la ŝanco renversi la testamenton estas nula, Jehoŝua postulis en sia respondo pagi el la ĉefa heredaĵo la transportadon de tiuj libroj al ni. **Amri**: eble proponi lasi la librojn en la apartamento, en loko kiu estu laŭ instrukcio de la Registristo pri Heredaĵoj (רשם הירושות) vizitebla de e-istoj.
ĉ) **Jehoŝua**: en Kroatio aperis poŝtmarko por la Valenten-Tago kun multlingvaj amdeklaroj, i.a. en la hebrea kaj E-o.

## 2. Buĝet-propono por 2023 (Ŝlomo)

**Ŝlomo** prezentas sian proponon; i.a. 130 mil NIS estas rezervitaj por aĉeti magazenon, kio ne sufiĉas por magazeno en la centro, sed ja en la periferio (**Ŝlomo**: ekz. en Ĥadera).
b) **Jehoŝua: e**ble la patro de Inbar, mem kontisto, povus helpi nin pri kontado, por kiu ni nun pagas 3,218 NIS, kaj eblus iom ŝpari. **Inbar**: li pretas senpage. **Amri**: ne decus tute senpage, sed eblus kontraŭ simbola pago. Ŝlomo skribu al Inbar kion oni devas fari. Dum la Zamenhofa Vespero ni devos voĉdoni por akcepti aŭ malakcepti la proponon.

## 3. Laborplano de la Kontrol-Komisiono por 2023 (Ŝlomo)

Dum la Zamenhofa Vespero ni devos voĉdoni por konfirmi, kion mi ĵus prezentis. Siajn konkludojn pri 2022 la Komisiono prezentos somere.

## 4. Nia oficejo (Ŝlomo)

**Ŝlomo**: aĉetinte la oficejon ni pagis 6-procentan akirtakson (מס-רכישה), sed kiel Societo, ni devus pagi nur 0.5%. Iu advokato proponis helpi (kontraŭ 30% kurtaĝo) ricevi la diferencon kiun ni tropagis (ĉ. 13,000 NIS), sed ni ne bezonas tiun oferton, ĉar eblas mem plenigi la

**2/…**

formularojn por peti tion; despli ĉar momente la oficejo ne estas luata kaj servas nur por la societaj bezonoj (ekzemple: stoki seĝojn).

**5. <u>Programo por la Zamenhofa Vespero</u>** (Amri, Ŝlomo)
**Ŝlomo** havas siajn oficialajn programerojn, **Jehoŝua** raportos pri la stato de ELI, **Amri** prezentos sciencan prelegon kaj la registritan teatraĵon “Tempo Rabita” pri Lidja Zamenhof (far Luiza Carol), kantos **Inbar** kaj **Mikaelo**, **Tali** dancos. **Amir** prezentos tradukitajn kaj ilustritajn kantojn. **Enrica** rakontos pri sia vivhistorio. **Jael** volontiĝis prezidi la Ĝeneralan Kunvenon.

**6. <u>La venontjara IK</u>** (Amri)
**Dror**: en nia retejo troviĝas la aliĝilo, la programo kaj la kotiz-detaloj. **Amri** resumis la informojn antaŭ la Estraro. ***Dankon al Dror por la reta aliĝilo!***

**7. <u>Israela Esperantisto 174</u>** (Mikaelo, Amri)
**Amri** sendos fotojn pri BET kaj tekston pri UK. **Demando**: kiom estu nigra-blankaj, kaj kiom estu koloraj (krom la kovrilpaĝoj). **Amri**: en la antaŭaj n-roj ni faris parton nigre-blanke por ŝpari iomete, estas diferenco de kelkcentoj da sikloj. Se eblas koncentrigi la fotojn en unu parto, eblas ĉi tion fari. **<u>Decido</u>:** *Amri decidu laŭ la enpaĝigita n-ro.*

**8. <u>UEA-aferoj en 2023</u>** (Amri)
Individua Membraro, Fondaĵo Canuto, UK – ni klopodos varbi individuajn membrojn dum la ZV. La ELI-kotizo restas 120 NIS jare. La MB-membroj de UEA estos subvenciataj far ELI, kiel ĉi-jare, per ĉ. 35 NIS – tiel ke ili pagu nur 70 NIS. Restos du “kanutitaj” membroj: Mikaelo kaj Inbar.

**La venonta kunsido**: lunde, la 9-an de Januaro 2023, je 20h00 (Alon-Turo-2, hibride).

*Protokolis: **Gabi Zeevi***